

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo/Majo 1980



24a Jarkunveno G E F A



Oberkirch
10a - 12a de Oktobro 1980
70 jarojn G E F A

24a GEFA-Jarkunveno en Oberkirch



La kastelo Schauenburg el la 11a jarcento, malantaŭ Oberkirch

foto: el la prospekto de Oberkirch

Aŭtune en Oberkirch

La impresoj pri la 32a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Nederlando estas ankoraŭ freŝaj, kaj jam estas anoncinda alia grava evento: la 24a Jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) en Oberkirch.

La dato, 10a – 12a de Oktobro 1980, estas preskaŭ tradicia. Kiam la aŭtuno prezentas sin en siaj plej variaj koloroj kaj azurblua ĉielo brilas super la majestaj montoj de la Nigra Arbaro, la ĉarma vinurbo Oberkirch bonvenigas vin. Prenu la trajnon sur la lineo Frankfurt - Basel ĝis Appenweier kaj daŭrigu la veturon per (rel)-aŭtobuso. Ĝis la fama kuracloko Baden-Baden la distanco estas nur 40 km, kaj je bona vetero estas videbla eĉ la katedraluro de Strasburgo, al kies episkopejo Oberkirch apartenis certan tempon.

Multo konserviĝis el la mezepoka periodo. Depost la 11a jarcento la kastelo Schauenburg gardas la urbon kaj la tutan Rench-valon. Bedaŭrinde Schauenburg estas nuntempe nur ruino, sed la serpentuma vojeto valoras, ĉar de tie vi havas belajn elrigardojn. En Oberkirch vivis Hans Christoph von Grimmelshausen, la plej fama germana poeto de la 17a jarcento. Li priskribis en sia „Simplizissimus“ per karakterizaj romanfiguroj ankaŭ la tiutempan vivon en la regiono.

El la montoj penetras la akra odoro de la malgrandaj brandfarejoj, en kiuj la kampuloj distilas la fama ĉerizbrandon „Schwarzwälder Kirsch“. Entute la fruktoj ludas gravan rolon. Kreskas en la regiono fragoj, persikoj, prunoj, mirabeloj, piroj kaj pomoj. Ne necesas akcenti, ke ĉiu kongresano kiel bonvena gasto trovos sian rezervitan loĝeblecon. La prezoj por la tranokto varias inter 12 kaj 50 markoj.

Detalajn informojn vi povos legi en la aliĝilo / provizora programo, disdonota per la distriktkomisiitoj. Eksterlandanoj povas mendi ĉe Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, D-6700 Ludwigshafen.
Limdato: 31. 8. 1980.

Nun iom pri la programo. Ĉiuj aranĝoj okazos en unu domo, la centre situanta „Stadthalle“. Tie, ne en la tro malgranda stacidomo, troviĝas ankaŭ la akceptejo, kie la kongrespaperoj estos eldonataj. Verŝajne ekspozicio dokumentos la 70jaran jubileon de GEFA. Ankaŭ libroj estos denove aĉeteblaj. Vendredon vespere la alvenantoj kolektiĝos en la gastejo „Pflug“ por bone manĝi, gustumi la ekskvizitan vinon kaj babilii.

Dum la oficialuloj kunsidas la sekvan sabatmatenon, la aliaj kongresanoj povos partopreni rondiradon tra la pitoreska urbo. Kuraĝaj kandidatoj ŝvitos dum tiu tempo pro la skriba parto de la lingva ekzameno. Tagmeze oni prenos la manĝon en la kongresejo. Baldaŭ atendas aŭtobusoj por la posttagmeza ekskurso, kiu kondukos al la „akvofaloj de ĉiuj sanktuloj“.

Anstataŭ la kutima kafotrinkado vi vizitos brandfarejon. Konvinkiĝu mem, kompreneble modere, pri la kvalito de la brando kun kolbaso kaj pano.

Kulmino de tiu tago estos la festvespero, dum kiu reprezentantoj de fervojoj, sindikatoj, sociala organizo, urbo ktp. transdonos siajn bondezirojn. Poste regos folkloro, muziko kaj danco. Dum la dimanĉa matineo la prezidanto de GEFA komunikos sian jarraporton. La kandidatoj plenumos publike la buŝan parton de la lingva ekzameno. Kiel averto pri la venonta 33a IFEF-kongreso 1981 sekvos sonfilmo pri Regensburg kaj la ekskursaj celoj. Eble aldoniĝos aliaj allogaj programeroj, sed ŝajnas, ke kaj la loko kaj la abunda programo altiros denove sufiĉe da kongresanoj. Kiel kutime GEFA invitas elkore siajn kolegojn kaj geamikojn el eksterlando, precipe el la najbaraj landoj. Vi ĉiuj estas bonvenaj.

W. B.

Wie erreichen Sie Oberkirch?

Bundesbahnstrecke Karlsruhe / Basel. Umsteigen in Appenweier oder Offenburg. Außer den im Kursbuch der DB ausgewiesenen Zugverbindungen bestehen Busverbindungen.

Interesentem por la Sprachprüfung, die vor der GEFA-Prüfungskommission abgelegt werden kann, melden sich bald, spätestens bis 15.9.1980, bei BAR Lautenbach, Bf 6400 Fulda schriftlich. Auskünfte: Basa 957/822/120. Prüfungstermine: 11. und 12. 10. 1980 in Oberkirch.

Sitzung des Arbeitsausschusses Esperanto mit den Bezirksbeauftragten und den Beauftragten für Sonderaufgaben am 22. 3. 1980 in Frankfurt/Main.

Der Beauftragte informierte die Mitarbeiter durch einen Kurzbericht für das Jahr 1979. Die Tagesordnung und die Kongreßvorschläge für den 32. IFEF-Kongreß in den Niederlanden wurden eingehend besprochen. Als GEFA-Beauftragte wurden benannt: Brandenburg, Graß, Kiefer, Schropp und Rösemann. Das Seniorentreffen soll Anfang September 1980 durchgeführt werden. Der Bezirk Köln wurde gebeten, die Ausrichtung zu übernehmen.

Die Vorbereitungen für die diesjährige Jahresversammlung (s. Seiten 1 und 2) sind zum größten Teil abgeschlossen. Die Anmeldevordrucke werden in Kürze verteilt. Ein gelungenes Programm erwartet Sie in Oberkirch am Rande des Schwarzwaldes.

Berichtigungen:

Anschriftenverzeichnis 1/1980, Seite 6: Vicprezidanto / Redaktoro Graß, poŝta tel. 0 21 22 / 33 33 35. Bba Essen Retzlaff, Basa 944/5135 Neue Mitglieder, Seite 5 Wilhelm Glosemeyer, Bf Münster Hbf

Kiel jam dum pli ol 20 antaŭaj jaroj ankaŭ en 1980 la Esperantosocieto UNUECO okazigos Internacian Esperanto-Ferio-Semajnon, ĉifoje en la kadro de la 700-jarfesto de Krommeniedijk. La datoj estas jenaj:

10-a ĝis 17-a de Aŭgusto 1980.

Limdato por aliĝo: 1-a de Majo 1980. Prezo 220,— nederlandaj guldenoj. Informojn kaj aliĝilon eksterlandaj geesperantistoj petu ĉe la sekretario J. Th. Fischer, Gagarinstraat 104, 1562 TD Krommenie/Nederlando

Skisemajno en Italio

La 21a internacia skisemajno (IFES) okazis de 26.1. ĝis 2.2. 1980 en Plan / Val Gardena, Italio, kun pli ol cent partoprenantoj el 9 landoj. La moderne ekipita domo de Dopolavoro Ferroviario situas tre proksime al ĉiugradaj skiejoj; skiliftoj, seĝliftoj kaj telferoj kondukas al preskaŭ ĉiu monta deklivo; bone preparitaj loĝoj por longdistanca skiado ne mankis, kvanto kaj kvalito de la neĝo estis tre oportunaj: la sukceso estis kvazaŭ garantita. Por la vesperaj programoj zorgis la partoprenintoj mem, precipe 11 el la francaj geamikoj: per verva skeĉo pri poemo de Raymond Schwartz kaj balede dancitaj scenoj pri la sezonoj de la jaro, ĉio en memfaritaj kostumoj, parte eĉ kun maskoj, ili plezurige ravis la spektantojn, kaj dum la tradicia karnavala vespero la muzikokasetoj, kiujn ili kunportis el Parizo, zorgis por gaja etoso ĝis malfrua nokto. La gajnintojn de la diversgradaj skikonkursoj kaj de lingva konkurso atendis pli ol dudek premioj, disdonitaj de la organizantoj — ge-Gimelli — en formo de pokaloj, memorŝildoj, libroj kaj medaloj. La kombinitan konkurson pri skiado kaj lingvoscio gajnis Jovan Mirković el Jugoslavio, kiu ankaŭ organizos la venontjaran IFES.

Ritt



Nia amiko Weidacher enmeze de s-inoj Gimelli kaj Kruse, akceptinte premiojn

Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon F-49150 Baugé prezentas la someran programon.
Unua periodo: 1.7. — 1.9.1980.
Dua periodo: 23.7. — 11.8.1980
Tria periodo: 13.8. — 1.9.1980.

Nekrologo

Nia multjara membro

Paul Buchwald

el Bremen mortis la 10an de Decembro 1979.

Nia kolego estis kunkonstruinto de la „Bird-fluga Linio“ inter Germanio kaj Danio. Li estis modesta kaj tre fidela membro de nia organizo kaj de la grupo Bremen. Ni perdis fidindan amikon, kiu restos ĉiam en nia memoro.

Al la familianoj ni esprimas sinceran kondolencan.

GEFA-estraro

Intensivaj preparkursoj

Unufoje IFA prezentas en sia programo intensivajn kursojn, cele al preparo de lernantoj kiuj intencas kandidatiĝi por ekzameno pri esperanto en sia propra lando.

La kursoj okazos en La Chaux-de-Fonds, dum la tuta paska semajno 1980, paralele laŭ tri niveloj: elementa, meza kaj supera. Ili disvolviĝos matene, kun taskoj plenumendaj dum la posttagmezoj; vespere la programo estos parte libera, parte varia. Gvidos la aranĝon profesiaj Esperanto-instruistoj, kun kompetenteco pri la programoj de la Esperanto-Institutoj franca, germana kaj itala.

Informas: Internacia FERIA Altlernejo, pf 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Ni legis por vi en „El popola Ĉinio“

la opinion de prof. Śecencz, dekanano de la fremdlingva fakultato de la Centra-Ĉina Pedagogia Instituto: „Mi kredas, ke Esperanto estas la plej bona internacia lingvo el ĉiuj lingvoj, naciaj kaj artefaritaj, ne nur el la vidpunkto de lingvistiko, sed ankaŭ pro ĝia senduba praktika valoro, kiun mi persone jam spertis dum pli ol 50 jaroj.“

Hungara lernejo-reformo favoras Esperanton

Esperanto estos oficiale instruata en hungaraj lernejoj ekde 1981, en la kadro de reformoj en la sistemo de lernado de fremdaj lingvoj. Lernantoj rajtos elekti ĝin kiel trian lingvon dum la 3-a kaj 4-a lernejaroj en gimnazio. Esperanto jam estas instruata en hungaraj lernejoj, sed kutime ne oficiale, krom en kelkaj elementaj lernejoj.

Pri eksterlandaj fervojoj

Francio

La Francaj Ŝtatafervojoj — SNCF — en distrikto de Strasbourg faras eksperimentojn per novaj altrapidecaj elektraj trajnoj. La longo de la trajno, konsistanta el du elektraj lokomotivoj kaj la trakiitaj vagonoj estas 200 metra, la kapacito 375 pasaĝeroj. Dum la eksperimentadoj la trajno atingis 250 km/h plej grandan rapidecon. La trajnon SNCF deziras cirkuligi ekde 1981 sur la linio Paris-Lyon en la laŭhora trafiko.

Sovetunio

Laŭ informo de Tass, la unuan, 400 km longan etapon de la fervojlinio Bajkal - Amur (laŭ la planoj ĝia tuta longo estas 3000 km) nomata „fervojo de la jarcento“, oni trandonis al la trafiko la 7-an de Novembro 1979. La trajnoj trafikos ĝis Tynda, „ĉefurbo“ de BAM.

Komenciĝis la konstruado de la plej granda, 15 km longa tunelo de la fervojlinio Bajkal - Amur. La laboro daŭranta inter eksterordinare malfacilaj cirkonstancoj finiĝos nur en 1983, samtempe kun la transdono de la tuta longo de la fervojlinio.

El „Hungara Fervojista Mondo“.

Anekdoto

Fervoja horaro.

Provinca stacidomo. La trajno malfruas.

— „Terure! La trajno malfruas pli ol 20 minutojn. Mi ne komprenas, kial ekzistas horaroj!?”

— „Sed se ne ekzistas horaroj, kiel vi sciis, ke la trajnoj malfruas?”

Danĝero

La malgranda Anjo krias:

— Paĉjo, panjo, helpu al mi!

— Nu, kio okazis? — zorgeme demandas la patro.

— Jen, la malica Joĉjo foliumas la libron kun la bestbildo kaj serĉas nomon por mi.

Gruppe Essen:

Der Arbeitskreis „Internationale Sprache“ trifft sich jeden Freitag um 16.15 Uhr im Hauptbahnhof Essen, Zimmer 301 (Eingang rechts neben der Gepäckabfertigung). Interessenten sind herzlich eingeladen.

Redaktfino por n-ro 3/80 estas la 10.6.1980.